[H. Salokannel] 1912

GVIDFOLIO TRA

# KOTKA KAJ ĈIRKAŬAĴO

Eldonita de la Societo Esperantista en Kotka, sub la aŭspicioj de U. E. A.

*Regno* : RUSUJO. — *Regiono* : *Granddukujo* FINNLANDO. *Provincaj lingvoj* : FINNA *kaj* SVEDA. — *Enlanda monunuo* : MARKO (1 mk. = 100 pennoj = 2.52 $). — *Urbo Kotka* : *Super* 10.000 *loĝantoj*. *Paroĥo Kymi* : 15.000 *loĝantoj*.

DELEGITOJ : Fino M. ANDERSSON, Kotka, Hovinsaaren sahan konttori ; Sro H. SALOKANNEL, stacio Kymi ; Sro E. ELENIUS, Suursaari.

SOCIETOJ ESPERANTISTAJ : *Soc. Esperantista de Kotka*, prezid. (1912), Sro EŬDO TENKANEN ; Klubo Esp. de Karhula, prezid. S-ro A. LEHIKOINEN, Kymi ; *La Vojo*, en Suursaari, prezid. S-ro E. ELENIUS.

*Kunvenejoj* : Ĉiam laŭ donata informo.

*Esperantajn* librojn k. t. p. vendas librobindisto Yrjö Sorvali, kiu aukaŭ akceptas abonojn de gazetoj, kaj librovendejo Kotkan Kirjakauppa O. Y. en Kotka.

## HOTELOJ KAJ RESTORACIOJ REKOMENDATAJ

*Hotelo Seurahuone* (1-a klasa, ĉambroj po 4-6 mk.) ; *Turisthotelo Kotka* (2-a kl. 2-4 mk.) ; *Sobreca Restoracio Osula* (2-4 mk.) ; *Hoteloj Kaleva* kaj *Vega* ; *Marista hejmo*.

KAFEJOJ : *Vanhala* (sukerajejo), "*Oma Pirtti*", *Osula, Pylkko, Työväentalo, Apollo*, k. t. p.

## DIVERSAJ INFORMOJ

FIAKROJ. — Por simpla veturo en Kotka 50 pennoj, de la stacidomo 75 p. ; nokte duoble. En la provinco 14 p. po kilometro, krom la unua gasteja distanco el la urbo 18 p. (laŭ gasteja takso).

STACIDOMOJ : *Kotkan asema* (malfermita 8-2, 3-6), haltejo *Kyminlinna* (6 km. el Kotka), *Kymin asema* (10 km. malfermita 8-2, 4-6). Personvagonaroj kun poŝto ĉiumatene, tagmeze kaj vespere al Kouvola. La personvagonaroj de Konvola ĉiumatene kaj vespere. *Karhulan asema* ĉe privata fervojeto en Kymi.

HELSINGIN YLIOPISTON KIRJASTO 0S5330

PREĜEJOJ : *Protestanta*, proksima de la stacio.

*Katolika* (rusa) en la urba parko.

*Marista* preĝejeto " Salem ".

*Metodista* kaj *evangelia* preĝejetoj.

*Kunvenejoj* por Kristanaj Unuigoj de junaj viroj kaj virinoj, angla kaj finna Savadaj armeoj.

En *Kymi* : paroĥa preĝejo, evang. preĝejeto.

En *Suursaari* : paroĥa preĝejo.

APOTEKOJ : " Uusi Apteekki ", " Kauppatorin Apteekki ", Drogvendejo. En Kymi " Karhulan Apteekki ".

KURACISTOJ : 5 kaj 2 dentistoj. En Kymi (Karhula), 1.

TEATROJ : Kansallisseuran-Näyttämö, ĉe Kotkan Pohja, Työväenteatteri, en laborista domo. Biografejoj : Tähtibiograafi, Uusi Biografi, Työväen Yhdistyksen Elävienkuvienteatteri, en Kymi : Kymin Työväenyhdistyksen Biograafi.

POŜT- kaj TELEGRAFOFICEJOJ : En ĉiuj fervojstacioj kaj en la urbo strato Kirkkokatu N. 20. Malfermitaj je la informitaj tempoj ĉe la pordoj.

LIMDEPAGEJO : Apud la suda haveno.

KOMERCAJ FIRMOJ : La plej grandaj : Kotkan Tukkukauppa Osakeyhtiö, Kotkan Rauta Osakeyhtiö, Suomalainen Lüke Osakeyhtiö, A. B. F. A. Collin, O. Y. A./B. Kolonial O./Y. En Kymi : Helilän, Kauppa Osuuskunta, A. H. Laitinen, Anton Hindersson, k. t. p.

INDUSTRIO : Eksporto : lignaj komercaĵoj, kartono, celuloso, k. t. p. Importo : Koloniaj komercaĵoj, faruno, koakso, cemento, kruda materialo por fabrikejoj, k. t. p. — 2 celulosaj fabrikejoj, 1 mekanika metiejo, elektra stacio kaj ŝipfarejo, 1 sukerfabrikejo, segilegoj, k. t. p. — En *Kymi* : 1 celulosafabr., 1 vitrofarejo, 1 mekanika metiejo, 1 karton- kaj pastfabr., 1 elektra fortstacio, brikfarejoj, segilegoj, k. t. p. La produktado de la fabrikejoj en la rivervalo Kymenlaakso estas la plej granda kaj la ŝipirado ĉe Kotka unu el la plej viglaj en Finnlando.

BANKOJ : Suomen Pankki (filio de l'ŝtatbanko), Kansallis-Osake-Pankki, Yhdys-Pankki kaj Pohjoismaiden Osakepankki (malf. 10-2). — En *Kymi*: Kymin kunnan Säästöpankki.

KLUBOJ kaj SOCIETOJ : Komerca klubo, Komunuma klubo, Navigacia klubo, Unuigoj de junaj viroj kaj virinoj, 4 sportkluboj, Muzikaj amikoj, Partikluboj, Esperanta societo, k. t. p. — En *Kymi* : Sobrecaj societoj, Saneca ligo, gejunulaj, gimnastikaj kaj partisocietoj, Preĝeja ĥoro, Kristanaj unuigoj de junaj viroj & virinoj, Esp. klubo, k. t. p.

ŜIPARANĜEJOJ : Karl Boström A. B., The Federation Stewedoring Co, Cadenius & Grahn, J. Bruun, Kotkan Välitys O. Y.

BANEJOJ. — Sallménin sauna, Kotkalan sauna, naĝejo por viroj, naĝejo por virinoj ĉe la mara en Katarina parko.

INTELEKTA VIVO. — En Kotka ekzistas 1 finna kaj 1 sveda ambaŭseksaj lernejoj, finnaj komercaj instituto kaj lernejo, geinstruista seminarieto, profesia lernejo, laborista instituto, metiistina lernejo, finnaj, 1 sveda, 1 rusa popollernejoj, orkestro, kantistaroj, biblioteko, legejo, k. t. p. En *Kymi* : multaj popollernejoj, komunuma biblioteko, k. t. p.

GAZETOJ : 3 finnlingvaj, 1 svedlingva, ĉiuj aperantaj en Kotka.

# VIDINDAĴOJ

a) *En la urbo* : Belajn vidaĵojn sur la maron oni havas de la monto Palotorninmäki kaj Norjan kallio. Sur bela insuleto Elisabeth troviĝas somera restoracio, kaj proksima de ĝi vidiĝas forlasita fortikaĵeto Fortslava. En la Katarina parko estas renkontataj restaĵoj de antaŭaj remparoj de la tempo, kiam ĉi tiu regiono estis fortikigita (antaŭ la fondiĝo de la urbo).

b) *En la ĉirkaŭaĵo* : Imperiestra fiŝkaptista pavilono Langinkoski sur la pentrinda loko ĉe samnoma akvofalo apud la elfluejo de la riverego Kymi. La pavilono estas konstruita kaj endomigita por la rusa imperiestro Aleksandro III laŭ malnova finna stilo. Eminentaj personoj vizitas ĝin tiam kaj ĉi tiam. Oni ĉefe kaptas salmojn kaj lavaretojn. Langinkoski estas unu el la plej favorataj promenejoj de la ĉirkaŭanoj. Distanco el la urbo 6 km. kaj el haltejo Kyminlinna 2 km. Pedelo prezentas la ĉambrojn.

Ĉ. 2 km. el Kyminlinna estas vidinda insuleto Munkkisaari en beleta akvofalo. En tiu ĉi loko antaŭe estis rusa monanejo, el kiu nuntempe restas nur kapeleto.

Proksima de Munkkisaari estas vidinda grandeta akvofalo Koivukoski.

Revenante al Kyminlinna oni preterirante rigardu la malnovan historian biendomon Kyminkartano. Dum la sveda tempo tiu ĉi domo estis la sidejo de la granda gubernio kaj svedaj reĝoj vizitis ĝin. Apud la haltejo oni povas ankoraŭ rigardi la malnovan forlasitan fortikaĵon, en kiu nuntempe loĝas rusa militista taĉmento. Transe de la rivero estas beleta ĝardeno.

De Kyminlinna oni povas promeni al la alta akvofalo Korkeakoski, 2 km. de la stacio Kymi. La akvo havas tie ĉi pli ol 4.000 ĉevalfortojn kaj irigas la kartonfabrikejon, muelilon kaj la elektran stacion el kiu estas transigata la forto al tiuj multaj fabrikejoj de la granda firmo Karhula Osakeyhtiö ĉe Karhula. De Karhula oni povas reveturi al Kymi (4.5 km.) per la fervojeto, aŭ al Kotka per vaporŝipetoj (4 km.), kiuj ĉiutage komunikas inter Kymi kaj Kotka. Krom la fabrikejoj, estas vidinda bienego Karhulan kartano, posedata de kapitano William Ruth kaj ekzemple kulturita.

*Suursaari*, la 12 km. longa altmonteca insulego meze de la Finna golfo, ĉ. 50 km. el urbo Kotka. Ĝi estas tre amata de ĉiuj turistoj, pentristoj, k.t.p. pro sia majeste grandioza naturo. La vidaĵoj de la montego Pohjoiskorkea k. t. p. estas ĉarmegaj sur la senbordan, bluan maron Krom tio, ĝi estas konata pro siaj strangaj montformacioj. Loĝantaro (ĉ. 850) konsistas el pilotoj kaj fiŝkaptistoj, kiuj ofte loĝas izolitaj de aliaj homoj kiel en sia propra regno, havas siajn preĝejon, oficistojn, intelektan vivon, ktp. Sur la insulo estas du lumturoj, rusa telegrafejo, poŝto, esp. societo, k. t. p.

Al Suursaari oni povas veturi kun poŝtisto aŭ pilotoj aŭ ankaŭ kun ofte veturantaj ekskursanoj.

Aranĝ. H. Salokannel. Septembro 1912.

Laborista Kooperativa Presejo, Diĵono

ho 25